

Bona Espero



Cirkulero 69

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a. decembro 2008

prezidanto: Otto Nelken ★ Hirschfeldstr. 6 ★ D-59581 Warstein

☎ +49-(0)2902-57460 ★ 📠 +49-(0)2902-911323 ★ 📧 u.nelken@t-online.de

Karaj geamikoj,

tre malfrue ĝi venas, sed ĝi venas, la ĉijara rondletero, kies finpretigon bedaŭrinde ĉiam denove diversspecaj obstakloj prokrastis, kial ni petas vian komprenon.

Tamen nun al la temo, kaj antaŭ ĉio la pozitivo! Ursula skribas:

Per la subteno de niaj amikoj eblis realigi la necesan koroperacion ĉe Isabella, la pli maljuna filino de nia instruistino Maria, kaj ŝi refoje bonege fartas.

Sed intertempe ekzistas ankoraŭ dua Maria ĉe ni, nome Dona Maria. Ŝi ja kiel konate estis kondamnita al 19 jaroj aresto, pro kunkulpo ĉe la fiuzo de tre filinoj (3, 5 kaj 9 jaroj) per ties patro (puno 23 jarojn aresto). Pro manko de spaco en la malliberejo oni dume donis al ŝi la liberecon. Ŝi laboras kiel urĝe bezonata purigistino en Bona Espero kaj purigas akuratege preskaŭ 100 pordojn kaj fenestrojn same kiel centojn de kvadrataj metroj da plankoj je la perfekta kontenteco de ĉiuj partoprenantoj (juĝisto, Bonesperanoj kaj ŝi mem). Ĉiu dua semajno ŝi devas prezenti sin ĉe la tribunalo (kun nia konfirmo pri ŝiaj agadoj ĉe ni). El ŝiaj entute sep infanoj intertempe neniu vivas ankoraŭ ĉe ni: oni adoptis kvar, kaj tri (Odete, la plej fiuzita, Deuzimar kaj Dinei) nun loĝas en Goiania kaj rajtas viziti sian patrinon en januaro.



Niaj spertoj estis bonege kun la 18 jara voluntulo Christian, la filo de germana ambasadoro, kiu iutempe financie estis subteninta la konstruon de nia urbodomo. Christian bone parolis portugale kun la infanoj, alkiutimiĝinte rapide al ni. Antaŭ ĉio li fervore laboris en la realigo de la granda arbo projekto (vidu suben). Bedaŭrinde li forlasis nin jam en septembro por ekstudi.

donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede
(BLZ / bankkodo 464 510 12)

kasistino:

Dagmar Rahn ☒ Hirschfeldstr. 3 ☒ D-59581 Warstein
☎ +49-(0)2902-700330, 📠 +49-(0)2902-700328 📧 dagmar@rahn76.de

Multaj eksaj kaj nunaj bonesperanoj, i.a. Tota, Adao, Grassielle, Cassius kaj Riviane, nun laboras ĉe Ulysses, nia prezidanto. Ties Esperanto-TV elsendostacio elsendas nun per satelito dum 24 horoj.

Bedaŭrinde Orlando, kompetenta pri ĉiuj agraraj agoj, forlasis nin pro profesiaj kialoj kune kun lia edzino Susi, la kuiristino. Sed ni daŭre restos en kontakto, ĉar ili baldaŭ enloĝigos sin en sian propran domon sur nia urba tereno. Valdemar, la antaŭa helpanto de Orlando kaj same nia eksa lernanto, nun ĉefe respondas en la agrara kampo.

La talenta lldete, kiu dankas nin sian edukon kaj instruon ĝis la abiturienta ekzameno, kaj sur kiun ni estis metinta gravajn esperojn, fine iris al Braziljo pro la pli bonaj profesiaj ŝancoj ĉe la Esperantistoj de la japana Oomoto-movado.

Kontraŭ tio la laboro kun la infanoj ĉiam malfacilas, ĉar la prokuroroj laste nur peris sekse misuzitajn knabinojn. Sur la foto kun kvar knabinoj vi vidas tute maldekstre Virginia. Ŝi estas psike malsana, ĉar la pli aĝa frato misuzis ŝin ekde kvin jaroj. Li minacis ŝin ĉe tio per granda maĉeto, - ŝi montris al ni ĉ. 30 tranĉcikatrojn kaj 12 cm longan cikatron sur la kapo. La drinkema patrino vivas kune kun siaj naŭ infanoj, kaj ĉiuj estas drogdependaj. La tria de maldekstre estas Naiara, 10 jarojn aĝa, ŝia patrino estas profesia prostituitino kaj jam iniciis la filinon en sia lerto. Kun la teruraj spertoj de ĉi-tiu ankoraŭ tiel juna knabino ni nun ankaŭ devas vivi. - Antaŭ ne longe "fuĝis" Virginia kaj Naiara. Maria kaj Ada povis "kapti" Naiara, sed Virginia saltis en la Rio da Cobras kaj malaperis. Nur post du horoj ni trovis kaj reportis ŝin. Imagu, unu de la knabinoj estus mortiginta per la venenaj serpentoj! Ni verŝajne estus devinta fermi Bona Espero !! Minimume ĉiuj televidaj kanaloj estus informintaj pri tio, ke ni ne sufiĉe bone povus atenti pri la infanoj. - Sed ambaŭ nur ŝatis travivi aventuron kaj samtempe nepre ŝatas resti ĉe ni. Ili ekde nun volas esti obeemaj kaj ŝanĝi sian vivon. -



Kompreneble tiaj okazaĵoj signifas streĉegon por ni plenkreskuloj ! Dekstre apud Naiara staras la 8jara Amanda. Ŝi loĝas ĉe ni ekde februaro, estas ankaŭ misuzita, spirite malforta kaj violenta. Ŝi rompis jam sep klinkojn kaj mordas la aliajn infanojn. Mi jam petis la prokurorinon, veni por akcepti ŝin denove, sed ne ekzistas loko por ŝi en psikatra terapio. Tio signifas por ni atenti 24 horojn!

En la lasta rondletero mi raportis pri nia konateco kun la pola TV-ĵurnalisto kaj aŭtoro Roman Dorbrzynski, kiu dum nia ĉeesto en la infanvilaĝo skribis la lastan parton de la kroniko pri 50 jaroj Bona Espero. Ĉi-tiu nun pretas 256 paĝojn ampleksa ilustrita verko kun la titolo "Bona Espero – idealo kaj realo" priskribas enhave kaj lingve en grandioza modo la tutan varioplenan evoluon de la institucio kaj mencias i.a. ankaŭ la specialan rolon de nia subtena organizo. Krom L.C. Zalewski-Zamenhof en lia impresa epilogo kaj sennombraj entuziasmaj legintoj kompreneble ankaŭ mia edzino kaj mi ŝatas emfazege rekomendi ĉi-tiun imponan libron. –

Mi rajtis travivi kaj subteni ĝian unuan prezentadon ĉe la ĉi-jara UK kune kun la aŭtoro, la geedzoj Grattapaglia same kiel profesoro L.C. Zalewski-Zamenhof kaj estis dankeme impresata pri la remarkinda intereso pri la ankaŭ per ĝia belega eksteraĵo konvinka verko. Ĉar la neta enspezo entute utilas al Bona Espero, mi ĝojegus kun ĉiuj al la kroniko partoprenantoj, se ĉi-tiu unua grava libro pri nia infanvilaĝo estus kiel eble plej favore akceptata. Ĉe ni troviĝas granda stoko da ekzempleroj. Vi povas mendi la libron ĉe ni, ĝi kostas 13 eŭrojn sen la sendokostoj.



Kampanjo de la UNEP (naturmedia organizaĵo de la UNO) celas planti unu miliardon da arboj ĝis la jaro 2015, por kontraŭbatali la kreskantan danĝeran regionan senarbigon kaj la ligitan tutmondan malbonigon de la klimato. En la franca urbo Wintzenheim la Esperantisto Michel Basso komencis ekde 2007 kun sia asocio TAKE realigi ĉi-tiun intencon kiel longdaŭran projekton de la Esperanto movado. Ĉi-tiu agado direktu al internacia solidareco ĉefe inter infanoj, kaj tio per la laborlingvo Esperanto. (<http://take.esperanto.free.fr/plantu/indekso.htm>)



Pro ĝia granda nekultivata areo oni elektis Bona Espero kiel unua loko kaj plantis intertempe la unuajn 500 arbojn. Por 12 eŭroj ĉe TAKE ĉiu povas iĝi patrono de unu arbo, elektebla el ĉ. 20 specoj. Ĉi-tiu prezo entenas la aĉeton de la arbido, la plantadon kaj la kvinjaran flegadon. TAKE zorgas pri la administrado kaj sendas al la patronoj konfirmon kun foto de ilia arbo kaj jaran raporton.

La ĉi-rilata institucio (ĉi-tie estas Bona Espero) ricevos el TAKE la tutajn 12 eŭrojn. La posta uzado de la arbo (ekz. rikolto de fruktoj) same utilas al nia infanvilaĝo. Internacia ĝiro al TAKE:

IBAN: FR58 2004 1010 1502 5494 6A03 650 BIC: PSSTFRPPSTR

donacokonto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ / bankkodo 464 510 12)

Ekde junio 2008 ankaŭ partoprenas 90 enloĝantoj de Wintzenheim, i.a. multaj lernantoj el la elementa lernejo, en la projekto sub la moto "Plantu por nia planedo!". Espereble baldaŭ kiel la unuaj same la lernantoj de Esperanto el la analoga lernejo el Möhnesee-Günne (30km for de Warstein) aliĝos al ĉi-tiu agado, ĉar ili ja havas jam leteramikecon kun la infanoj el Bona Espero. Kiel speciala avantaĝo povus same montriĝi ĉe tio la pli longe daŭra ĝemeliĝo inter la urboj Möhnesee kaj Wintzenheim.

Je la fino mi ŝatas esprimi mian dankon kaj koran gratulon al mia Esperanto instruisto kaj vicprezidanto Bernd Schönberner je lia speciale eksterordinara jubileo: Ekde 20(!) jaroj fascinas Bernd kiel "Don Espero" sennombrajn homojn per sia lertega magio. Liaj tutaj gaĝoj, donacitaj al Bona Espero, sumiĝas ĉ. trionon de la jara subteno el nia organizaĵo. Kiel ties membro li decide respondas pri la ĉi-jara grandanimega donaco de la Kolping-asocio el Meschede.

Krom al ĉi-tiuj ambaŭ kiel anstataŭantoj nomitaj mi kiel ĉiam sincere dankas al ĉiuj subtenantoj - ankaŭ (kaj ĝuste) por ties plej malgranda donaco, kiu por kelkaj eble signifas evidentan oferon. Dum mia nun dekjara "oficdaŭro" mi bedaŭrinde nur povis konatiĝi kun tre malgranda nombro el ili persone.

*Mi deziras al ĉiuj de vi el tuta koro
benitan Kristnaskon
kaj
pacplenan Novon Jaron
via
Otto Nelken*

